CNT AIT FAI
INTERNACIA LABORIST-ASOCIO
# INFORMA BULTENO
NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO
REDAKCIA ADRESO: ESPERANTO-FAKO Av. DURRUTI 32-34
BARCELONO — HISPANIO
IBERIA ANARKISTA FEDERACIO
II-a jaro | 10 Septembro 1937 | Numero 5

## S. A. T. NE TOLERAS FAŜISMAJN AGOJN DE KIU AJN KOLORO

Post la S. A. T.-kongreso k-do Bas Wels el Roterdamo adresis al nia redakcio leteron, kiu estis tradukita hispanen k publikigita en "Buletin de Informacion" k kelkaj aliaj gazetoj. Gies eksterordinara graveco igis nin presi ĝin.

Al la k-doj de "Informa Bulteno" k ĉiuj S. A. T.-anoj en Barcelono! Varmajn salutojn al vi ĉiuj! Varmajn salutojn de el la S. A. T.-kongreso de multaj honestaj gekdoj, kiuj ege bedaŭris, ke neniu el vi povis ĉeesti nian brilan manifestacion de forto k grandioza solidaro, nian neforgeseblan S. A. T.-kongreso en Roterdamo.

Kiam ni ricevis vian leteron de la 29a de Julio, la 17 S. A. T.-kongreso, al kiu 860 gek-doj aliĝis k kies solena malfermo okazis en plena salono kun 1200 esperantistoj el 19 landoj, jam estis pasinta. Do eĉ vian leteron ni ne povis voĉlegi en la kongreso, sed tamen pri via grava afero estas parolita en unu el la laborkunsidoj partoprenitaj de 700 gek-doj. Tio okazis en la lasta kunveno, kiam temis pri la monsendo al Hispanio. (ni kolektis en la interfratiĝvespero proksimume90 guld.) Hernandez pledis por "Popola Fronto" per fajra parolado k klarigis al la kunveno, ke en Hispanio akte la partioj ne ekzistas, ke en la antifaŝisma tendaro batalagas brak'ĉe brako, kvazaŭ la proletaro ne konsistus el politikaj skoloj, kiuj pri kontraŭfaŝisma agado havas malsaman opinion. Hernandez fiparolaĉis, krazaŭ la Maja okazintaĵo en Barcelono estus elpensaĵo de kelkaj idiotoj. Li tute forsilentis ilin. En tiu momento post lia laŭvera raporto pri Hispanio, iu k-do parolis por doni alian bildon pri la afero, sed ho ve, el Barcelono neniu ĉeestis. Tiam la prezidanto de O. K. K., kiu tiel multe pledis por la ordo, kamaradeco k harmonia sfero en la kongreso, petis la parolon k tuŝis la aferon, kiu dum duonhoro boligis la animstatojn de la kongresanoj k endanĝerigis ĝisnunan plenharmonian kongreson, kiu certe estas la plej giganta el ĉiuj ĝisnunaj S. A. T.-kongresoj. Sed mi forgesis mian prezidantecon k mi nur pensis al vi ĉiuj, kiuj ne povis delegi reprezentanton por peti la parolon k doni la veran bildon pri la stato en Katalunio. K mi parolis en via loko k kun retirita spiro oni aŭskultis, kiam mi rakontis, ke en Katalunio la plej noblaj antifaŝistoj estas buĉataj de aliaj antifaŝistoj, proletoj samkiel ni. Mi svingis en la salono numeron de "Popola Fronto", en kiu la k-doj el Barcelono estas nomataj "spionoj de la faŝismo", kiuj meritas plej severan punon. Mi nomis Hernandez' on la plej fia kalumnianto, ĉarlatano, kiu atakas S. A. T.' on en organo, kiu estas dediĉita al la antifaŝisma agitado. Ĉu doni nian kolektitan monon al tia gazeto, al tia movado? Mi proponis lasi la decidon pri la mono al la Roterdama S. A. T.-anaro.

La prezidanto de la laborkunsido avertis min, ke mi tuŝas danĝeran temon, alia stultulo venis kun ordopropono por silentigi min, sed li ne sukcesis. Aŭdiĝis voĉoj, kiuj instigis daŭrigi, aliaj malaprobis. Tamen mi daŭrigis, sed nur kelkajn frazojn ankoraŭ mi diris, ĉar mi sentis, ke mi estas plenuminta mian proletan devon, ŝuldatan al niaj k-doj en Barcelono. Mia propono preskaŭ unuanime akceptiĝis. Sed ho ve, Hernandez volis sin defendi. Multaj por, aliaj kontraŭ. Fine li parolis, sed kie subite restis lia elokventeco? Mi parolis pri fantaziaĵoj laŭ lia aserto. Li volis ĉion malkonfesi, sed en la salono oni komencis krii, k malafablaj vortoj flugis al lia kapo.

Tiam lia elokventeco tute lasis lin sola, k mi kredas, ke li ĝojis, kiam la prezidanto forprenis al li la parolrajton.

Jen gek-doj el Barcelono kio okazis en la lasta laborkunsido de la 17a kongreso. Tiun vesperon mi neniam forgesos. Ĝi estis peco da klasbatalo, ĝi estis luktaĵo kontraŭ perfido k mensogo.

Karaj gek-doj mi plenumis mian devon, oni silentigis vin, mi por vi parolis. K mi ankoraŭ ofte parolos pri Hispanio, kiu kruele sangas el pli ol unu vundo.

Restu fidelaj al S. A. T., ĉar en S. A. T. estas multaj, kiuj apartenas al viaj amikoj. S. A. T. ne toleras faŝismajn agojn de kia ajn koloro!

BAS WELS

# PROMENO AL ORIENTO

I

Anglio inventis Japanion por reteni la rusan ekspansion al Azio, pro kio gi timis kiam Rusio sin direktis al Hindio suprenirante la montaron Himalaya, sed pro kiu ĝia timo pligrandiĝis, kiam Rusio, ŝanĝante la direkton, alvenis al Pacifika Maro. La brita politiko vidinte la moskvanojn lokigi sin en Manĉurio, ektimis pri sia kolosa ĉina merkato k pri la libero en la orientaj maroj. Tiam la angla gazetaro, bona servisto de sia registaro, komencis rekomendi amikecon kun Japanio. Alianco inter la aroganta granda angla potenco, kapo de la blanka raso, k flava nacio eke ŝajnis nerealigebla utopio. Eĉ rimarkinda absurdo. Nu en 1902 la utopio iĝis realaĵo alianciĝinte Anglio k Japanio. K en 1904 Japanio komencis kampanjon kontraŭ Rusio, kiun ĝi venkis k Rusio estis devigita retiri sin al Siberio.

Tiu estis unua pogromo de blanka eŭropa nacio fare de alia raso. Anglio restis tre kontenta pri la militkapabloj de sia aliancano, tamen ĝi samkiel Usono ne permesis al ĝi akiri kontribucion. Tio ja pligrandigus ĝian militpotencon. Pro tio Japanio, kiu estis malriĉa, devis kreski malrapide. Tamen nun ĝi havis jam Koreon k gajninte Manĉurion, ĝi estis jam sufiĉe grandkreska.

Hodiaŭ ĝi havas 700000 kvadratajn km. k 80000000 loĝantojn. Sed, kompare kun Ĉinio—etulo. Al la ĉinoj ja restas, kvankam tiom da forraboj, pli ol 6000000 kvadratajn km., sur kiuj loĝas proksimume 400000000 homaj estaĵoj.

Jen la grandega pastelo, kiun volas formanĝi Japanio sen neglekti krome la alian najbaran grandegulon Rusion kun 23000000 kvadratajn km. k 180000000 loĝantoj.

II

Kial Japanio aspiras batalegi kontraŭ ĉi gigantoj Car ĝi volas solvi la problemon pri sia malriĉo, forprenonte por si la ĉiniajn k siberian minojn. Ĉinio posedas en la provincoj Chen-Si k Chan-Si la plej grandajn ŝtonkarbajn tavolojn. Bonega kvalito k senpere sub la terŝelo.

Bona akiraĵo estus por ĝi ankaŭ la rusiaj minoj de Kusnetz, se ĝi povus atingi ilin. Ĝi troviĝas samkiel Hitler k Mussolini antaŭ la minaj riĉaĵoj de Hispanio, k Ĉinio kiel Iberio estas la granda krucvojo, sed kun diferenco pri teritorio k nekalkulebla loĝantaro. Chang-Kai-Chek, se li havas sifiĉe de armiloj, povus armigi 8-10 milionojn da soldatoj, armeo, kiu neniam alĉepiĝus. Tiel la milito povus daŭri multajn jarojn. Tio ja sufiĉas por Japanio elspezi sian lastan jen'on.

Pro tio ke Mikado, kiel siaj samabicianoj Hitler k Mussolini, ne havas sufiĉan monon, li eliras al la grandaj geografiaj vojo por forrabi ĝin de ties posedantoj.

Sed kio estas malbona por la riĉuloj estas la fakto, ke ĉi eliro de Mikado al kampanjo komplikigas la aferojn de Okcidento, ĉefe tiun de Iberio.

Inter Nanking k Madrido jam ekzistas interrilatoj, kiuj jam troviĝas sur la lipoj k ankaŭ, nature, en la koroj de la iberoj k ĉinoj. Sed kiu tion bedaŭras estas la anglo, ekspluatanto de la grandega regiono de la rivero Yantg-Se k de la suda Ĉinio. Japanio, potenca, industria k eksporta nacio (k por pligrandigi sian industrion ĝi bezonas minejojn) forpuŝos el ĉi regionoj la anglan industrion. Manchester, Shefield, Birmingham, Glasgow ektremas k insistadas ĉe la Londona Registaro evitigi iel ajn la katastrofon. Sed la registaro troviĝas en grandaj malfacilaĵoj por favore interveni en la afero. Japanio ne akceptas intervenon nek peradon. Gia miliontuna militŝiparo, perfekte armita k bonege priservata, permesas alĝi tre vastan agad-liberon.

K la sinjoroj de la "Neinterveno" pri Iberio devas repripensi, konsiderante la danĝerojn pro la interveno en Ĉinio, k pri la eraro farita de ili, elpensinte Japanion k ĵetinte ĝin kontraŭ Rusio antaŭ 35 jaroj.

III

Ĉu komplikiĝos la Azia konflikto pro la penetro de Rusio en ĝin? Certe Sevetio ne deziras tion. Sed ĝi jam estas preta por iu jan evento. La siberia orienta Rusio hodiaŭ estas pli loĝata ol antaŭe la milito. La siberiano havas duoblajn fervojojn, ekzistas aeroplan-havenoj en Kabarovska, Irkust, Vladivostock k aliaj lokoj. La orienta aviado disponas 500 flugmaŝinojn el la plej perfektaj k rapidaj. La loka armeo estis konsistigita antaŭe 3 jaroj (k certe ĝi estas pligrandigita) el proksimume 200000 soldatoj, 50 grandkalibraj kanonoj, 400 aliaj kanonoj, 3000 maŝinpafiloj k 400 tankoj.

Tial Rusio estas preparita por la milito ĉe ambaŭ frontoj, k ĝi potence povas operacii ĉe la okcidenta fronto, se la rabistoj el Eŭropo intencas profiti la orientan militon por provoki tiun de Okcidento.

Ni ne forgesos ilin k ekbatalos pli kuraĝe ol iam ajn.

K vivu Ĉino tiel libera el japonoj, kiel ni deziras ke Iberio estu libera el italoj, germanoj k... angloj.

GONZALO DE REPARAZ




Musolini k Hitler lumigas la mondon.

# C. N. T. TIA, KIA MI VIDIS ĜIN

Antaŭ ol vizitis Hispanion al mi plaĉis la sinteno de C. N. T. pri la batalo kontraŭ la faŝismo k pri la sociala revolucio; sed mia ŝato estis multe pli granda, havante kontakton kun ĉi organizo k kiam mi povis vidi rekte ĝian laboron.

Mi estis en Hispanio por insisti pri ĉio, kio favorus al P. O. U. M. post kiam ĝiaj ĉefoj estis arestitoj k post kiam oni aspiris nuligi ĉi organizon.

Mi atendis la simpation de C. N. T. por mia laboro, sed mi ne atendis pli ol ĝeneralan helpon.

Antaŭ ĉio C. N. T. k P. O. U. M. havis socialan filozofion tre malsaman, kiuj pro la sama kaŭzo apartiĝis unu de la alia C. N. T. estas anarkista k P. O. U. M. marksista. Tio estigis diferencojn en la politiko k certan konkurecon en la propagando k organizado. P. O. U. M. kritikis tre ofte la ĉefojn k la taktikon anarkistajn. P. O. U. M.—gvidantoj erĉis membrojn inter la vicioj de C. N. T. k ĉe tiaj cirkonstancoj estas tre kompreneble, ke C. N. T. ne estus streĉinta sin por defendi P. O. U. M., sed mi ne trovis tiajn rezervojn. Por C. N. T. ĉi ĉio estis demando de principoj k temante pri principoj estis forgesitaj ĉiuj konsideroj.

P. O. U. M. demonstris, ke estas forto pure antifaŝista; ĝi demonstris sian sincerecon por la defendo de la laboristaj rajtoj k por la preparo de la sociala revolucio. Ĝi estas, senjuste persekutata k ĉi ĉio sufiĉas. C. N. T. hezitis nek unu momenton por meti sin al la flanko de P. O. U. M. k peti juston por ĝi. Ni ne trovas alion ol admiron pro ĉi sinteno de C. N. T., kiu ne nur estis esprimita per paroloj, sed per agoj.

La Regiona Komitato en Barcelono disponogis al mi kiel interpretanton k konsilanton k-don A. Souchy, sekretarion pri la internacia departemento. Oni disponigis al mi siajn aŭtojn, per kiuj mi travojaĝis pli ol 2000 km. La Nacia Komitato en Valencio estis ankaŭ bonanima je sia helpo. Oni sendis energian proteston al la registaro pro la malpermeso de P. O. U. M. K-do Vazquez la nacia sekretario, en granda mitingo en Valencio prononcis diskurson, per kiu petis juston por P. O. U. M. k C. N. T. destinis unu el siaj ĉefoj kiel pledanton por P. O. U. M.

Ĉi ĉio estis farita sen nenia marĉando, sed kiel devo de unu proleta organizo al alia organizo de la laborista klaso. C. N. T. ne arogis pro sia gesto, sed ĉi ĉion ĝi faris kiel io natura, kio rezultas implice el ties principoj. Mi restis tre kortuŝita ĉe la vido de la integra moralo de C. N. T.

Plie mi povis observi multe pli da aferoj ol ĉi ĉion k mi restis impresita pri la forto de C. N. T. Ne estas necese diri, ke ĝi estas la organizo plej granda k plej vivanta de la hispana laborista klaso. Tio estis ja evidenta ĉiel k ĉie. La grandindustrioj estas komplete en la manoj de C. N. T. La fervojoj, la rad- k martransporto, mekaniko, teksaĵa industrio, elektro, konstruado k agrikulturo. En Valencio U. G. T. havas pli da kontrolo ol en Barcelono, sed ĝenerale la man-labiristoj apartenas al C. N. T.

Mi vidis min impresita de la eksteraj signoj pri la povo de C. N. T. En Barcelono ĝi okupis la domon, kiu apartenis al la plej granda kapitalista grupiĝo, kiu ekzistis antaŭe 19 de Julio 1936. Ĝi estas monumenta konstruaĵo komparebla nur per la vasta strukturo de la Centra Domo de la Transporto pri Pasaĝeroj en Londono en la parko de St. James. En Valencio C. N. T. okupis la palacon de markizo el la malnova reĝimo. Ambaŭ domoj elstaras kiel abelujoj kun bone organizitaj aktivoj, sekretariejoj, transporto, defendo, propagando, publikigado, internacia departemento ktp. ktp. En ambaŭ urboj multe da konstraŭjoj estas okupataj de pluraj sindikatoj: de konstruado, de la laboristoj pri elektro, de la transporto, ĉiuj aliĝintaj al C. N. T.

Mi sentis min impresita prila organizado de C. N. T.-anoj por partopreni en la milito kontraŭ la faŝismo. Mi restis mirigita pro la alvokoj al ties anoj por aligi sin al la batalfortoj je la respondo, por kompletigi-batalionon de la Morto, kiu devis anstataŭi neniigitan regimenton, pro la literaturo k la arikoloj verkitaj por stimuli la laboristojn doni ĉion al la batalo kontraŭ Franko.

Mi restis intense impresita pri la revolucia agado k la konstruada laboro de C. N. T. La grandaj agoj elmontritaj de la laborista kontrolo en la industrio estas inspiro. Oni povas preni kiel ekzemplojn la laboron en la fervojoj, en la metalurgio, en la teksaĵa sindikato. En ĝia sinteno laŭ mia kompreno estas nenio spektakla k pro tio havas signifon.

Mi rememoras pri la reorganizado de la kinaro en Barcelono. Kapitalista trusto decidis konstrui en Barcelono teknikn centrn por fari k kopii filmojn. Venis 19 de Julio 1936 k la italaj kapitalistoj forkuris. La laboristoj okupis sin pri la trustoj k finkonstruis la domon, k nun oni laboras en ĝi perfektorde. La teknikistoj de ĉi industrio, ĉiuj anoj de C. N. T., estas egalaj al la teknikistoj el la sama industrio, troveblaj en kiu ajn lando.

Mi rememoras ankaŭ pri okazo tre malsama. Malgranda urbo, en ĝi estis 17 apartaj razistoj, kiuj unuiĝis k faris kolektivon al C. N. T. Ili prenis la faŝistan klubon, kiu ekzistis antaŭe. Mi vizitis ilin matene unu dimanĉon. En la salono, bone ordigita, sidis la laboristoj, atendante sian interalternon. En ĉi salono de la faŝista klubo la 17 razistoj laboras per ĉiuj instrumentoj tiel bone kvazaŭ ili laborus en iu razejo de West-Londono aŭ Nov-Jorko. Estis mirinde vidi ĉi ekzemplon pri kooperado.

Sed pli ŝatinda ol ĉio estas mia vizito al la agrikultura kolektivo en Segorbe. Nun mi ne povas priskribi detalojn, sed la spirito de la kamparanoj, ties entuziasmo, ties konvinko, ke ili kontribuas per sia laboro al la komuna forto—ĉio estas inspiro.

Ankoraŭ estas angloj k amerikanoj, kiuj konsideras la anarkistojn kiel nekontroleblaj, neeblaj al disciplino, sed la hispanaj anarkistoj de C. N. T. entreprenas konstruadon tiom grandan, kioma ankoraŭ ne estas farita ie ajn de la laborista klaso.

En la fronto ili batalas kontraŭ la faŝismo; en la ariergardo konstruas la novan socion laboristan k komprenas ke la milito kontraŭ la faŝismo k la sociala revolucio estas nedivideblaj.

Ĉiuj, kiuj estas vidintaj kion la hispanaj anarkistoj faras, devas respektegi k danki ilin. Ili krom ke rezistas kontraŭ la faŝismo kreas ja novan laboristan ordon, kiu estas la unika alternativo je la faŝismo. Tio estas vere ekago plej granda, kian ĝis nun estas farintaj la laboristoj en kiu ajn mondparto.

FENNER BROCKWAY

---

K-do Augustin Villarreal deziras korespondi kun diverslandaj k-doj pri pluraj temoj. Adreso: str. Serdeña, 464-I-I, Barcelono.

# CASA C. N. T. K F. A. I.

Kara leganto, mi priskribu al vi la domon, en kiu estas redaktata "Informa Bulteno". T. e. Casa C. N. T. k F. A. I. Mi tamen ne konsideras necese priskribi ĝian eksteron. Multaj domoj ja alekstere similas treege. K poste—vi povas vidi ĝin ĉi-tie. Do permesu al mi akompani vin enen.

Jen ni trapasas la sojlon de la ĉefpordo. Sed vi eniras unuafoje ĉi domon k ne scias kie troviĝas Esperanto-Fako (Kiel esperantisto ja ĝi pleje interesas vin). Pro tio vi turnas vin al la informejo, kiu troviĝas senpere ĉe la enirejo gazetoj, revuoj, broŝuroj. Pluraj laboristoj estas legantaj... Nu jen la bibliotekisto. Li montriĝas tre komplezema. Volas montri al ni latutan bibliotekan trezoron. K irigas nin al·alia salono. Ankaŭ ĝi plenplena de ŝrankoj k bretoj da libroj.

La komplezema bibliotekisto parole antaŭas nin: "Demandu. Ne ĝenu vin. Mi al multaj kiel vi estas klariginta. En ĉi biblioteko mi laboras ja 45 jarojn. Jen, ĉu vi vidas ĉiujn ĉi librojn? 55000. Ĉiujn mi ordigis. Akurate, fervore.



mem. Apude de la informejo vi ekvidas surbrete gazetojn. Vi volas aĉeti. Sed enspezanto ne ĉeestas. K neniam ĉeestas. Pro tio vi lasas surbreten la moneron. K sekvas laŭlonge de la teretaĝo. Ĉi-tie estas la Komitato pri vunditoj, la Lernejo por Militantoj k diversaj riparejoj.

Interbabilante ni atingas la interetaĝon. En ĉi-etaĝo troviĝas Komitato pri la Defendo, Komitato pri la viktimoj de la faŝismo. Promenante sur la koridoro vi ekvidas plurajn kamparanojn sunbrunigitajn. Unuj eniras, aliaj eliras, Kelkiuj laŭte interdiskutas. Jes, leganto, ĉi-tie troviĝas ankaŭ la Regiona Komitato de la Kamparanoj. Kamparanoj venas ĉitien por informi sin pri iu afero aŭ peti konsilon. Aŭ protesti, se aliuloj provas obstrukci, disorganizi ties kolektivojn...

Nu ni lasu nun la kamparanojn k sekvu supren. La ĉefetaĝo. En ĉi etaĝo, kara leganto, troviĝas la Lokala Federacio de la Sindikatoj, la Dom-administracio, la Kunvenejo k la Biblioteko.

La tre vasta kunvenejo nun servas kiel lekciejo. Preskaŭ ĉiutage je la 7 posttagmeze okazas prelegoj. Diversfakaj intelektuloj donas siajn lekciojn al la racionalistaj instruistoj, kiuj devas eduki k klerigi la novan generacion laŭ la novaj principoj. Tiuj de la Moderna Lernejo, proklamitaj de Francisco Ferrer.

Nu ni kontentiĝu per tiu ĉi klarigoj pri la Recionalista Lernejo k vizitu la Bibliotekon.

La Biblioteko. Tre granddimensia salono. Egaj fenestrohavaj ŝrankoj. Plenplenaj de libroj. Breto sur breto. En la mezo de la salono du grandaj tabloj. Sur ili vicigitaj Por ke neniu rajtu riproĉi min". Poste li klarigas, ke vi povas trovi librojn pri ĉiuj branĉoj de la scienco. Pri Literaturo, Sociologio, Filozofio, Historio, Mekaniko, Himio, Elektrotekniko, kc. Paralele al ekonomistoj, sociologoj, scienculoj estas akcentitaj literaturistoj, verkistoj, pentristoj, muzikistoj ktp. El ĉiuj epokoj. Antikveco, Renesanco k laNuno. Ĉi-tie estas Homero, Platono, Aristotelo, Dante, Tasso, Adam Smit, Shekespeare, Darwin, Kant, Marks, Goethe, Schiller, Heine, Wagner, Einstein, Voltaire, Rousseau, Zola, Hugo, Bakunin, Puŝkin, Lermontov, Dostojevskij, Tolstoj, Kropotkin, Gorkij, J. London, Servantez, Espronseda, Lope de Vega. K multaj k multaj aliaj. En originalo aŭ en traduko. Plie troviĝas ĵurnaloj, jarkolektoj da gazetoj, revuoj, bultenoj, aperintaj en 19, 18 k ĉe 17 jarcento.

Laŭ deklaroj de vojaĝantoj, kiuj vizitis la bibliotekon, la lasta estas el la unuaj.

Nun, kara leganto, ni prenu la lifton k supreniru rekte la trian etaĝon. Dume mi diretu al vi ion pri la unua k dua etaĝoj, kiujn ni ĵus preterpasas. En la unua etaĝo troviĝas la Nacia Komitato de la Teksaĵa k Fabrila Industrio k la Nacia Komitato pri Kotono. En la dua: La Lokala Federacio de la Ateneoj, la Federacio de la Racionalista Lernejo, la Regiona Komitato pri Defendo, la Komisiono pri la Ekonomia Kunordigo, la Ĵuĝ-komisiono, la Arkivo de la internacia gazetaro. En la oficejo de la Arkivo 4 poliglotoj tralegas ĉiutage la ĉefajn diversnaciajn gazetojn. La samaj poliglotoj redaktas unu ĉiutagan bultenon multpaĝan k unu samajnan kun ekstraktaĵoj el la amerika gazetaro.

# HISPANIO

—Pueblo!
ĝis kiam
al vi estos fremdaj
la teraj bonaĵoj?
Aŭdu, ekfrapis la horo
de la grandeca justo—
la Libero.
Barcelono
pretas ree ekflami.
Ektondris potenca k aŭdaca
apelo por alvoki
al la grandeca celo la maron
da homoj, kiu ondis
sur la bulvardoj:
—Trabajadores de toda España!
vi,
kiuj nek paŝon
malantaŭen iras dum la batalo,
vi,
kiuj konas la potencon de la ĝenerala
[striko...
—Vi-va-a!
—Vi-va la accion direkta!
ĉesigis la oratoron.
—Viva la revolución social!
li prononcis
k la salonego, kiu entenis
nur plenmanon el ili ektondris:
—Viva-a-a-a!
—Viva la revolución social!
Ĝi ektondris potence
k kvazaŭ uragano
ekmovigis la oceanon
da homamaso,
pro kiu nigris la bulvardo...
Barcelono,
ree revoluciema,
leviĝis
k la tuta Hispanio...
La laboristoj, elirinte
sur stratoj k avenuoj
k placoj
komencis batalon,
kreskigis barikadojn.
—Revolucio!...
Hispanio,
cia labora popolo
denove leviĝas.
Sur la stratoj
de la urboj k vilaĝoj
floras la floroj
de la revolucio
k de miloj da sopiroj
al pli bona vivo.
Se ne hodiaŭ
ili morgaŭ efektiviĝos.
Flirtadas ja ankoraŭ
sur multaj konstruaĵoj
ruĝnigraj standaroj
k sur ili:
—Viva el comunismo libertario!

P. ĈIVIKOV

I. L. E. S. K LA BARCELONAJ S. A. T. - ANOJ NE DELEGIS LA REDAKTORON DE "POPOLA FRONTO" REPREZENTI ILIN DUM LA S. A. T. - K. I. P. E. - KONGRESOJ. AL LA KUNVENO, KIU OKAZIS LA 29 DE JULIO K KIU REPREZENTIGIS LIN NE ĈEESTIS I. L. E. S. - DELEGITO. EL LA ĈEESTINTAJ 11 ESPERANTISTAJ ORGANIZOJ 7 LAŬTENDENCE ESTAS NEUTRALAJ K LA ĈETERAJ 4 ESTAS KARAKTERIZEBLAJ MULTE PLI KIEL I. P. E. - TENDENCAJ OL S. A. T. - TENDENCAJ, ALIVORTE KONTRAŬ S. A. T. - TENDENCAJ. DO PRO KIO ĈI ORGANIZOJ "UNUANIME KOMISIAS (TIEL JA TEKSTAS LA PROTOKOLO) LA VALENCIAJN POPOLFRONTAJN K - DOJN REPREZENTI NIAN K. E. K. K. DUM LA S. A. T.-KONGRESO"? KIEL ESTAS KOMPRENIGEBLA ĈI FENOMENO? ĈU S. A. T. - KONGRESO ESTAS MANIFESTACIO DE LA LABORISTA ESPERANTISMO, AŬ DE LA NEUTRALISMO, KONTRAŬ KIU S. A. T. PRINCIPE BATALAS K KIES ANTIPODO ĜI APERAS? ONI HAVAS LA PAROLON.

---

Jen la lifto elpelas nin sur la trian etaĝon. Alblovas nin alia atmosfero. Pli freŝa k pli dinamika. Aŭdiĝas petolemaj interbabiladoj, k revoluciaj kantoj. Ĉi-tie, leganto, krom la Regiona Komitato de C. N. T., troviĝas ankaŭ la Regiona Komitato de la Liberecana Junularo. Ties presorgano "Ruta", ĵus estas aperinta k junuloj alkuris por ekspedi ĝin. K ilia entuziasmo k ilia fortstreĉo estas tiel sentebla. Kvazaŭ elektra kurento trafluas... Babiladoj, kantoj, petoloj... Jajes! la junularo kantante batalas k venkas, detruas k konstruas.

K fine ni atingas la kvaran etaĝon. Aŭ la lastan. La poreksterlanda propagando. Ni iru laŭlonge de la vasta koridoro. La klakado de la skribmaŝinoj ektranĉas' viajn orelojn. Al la klakado de la skribmaŝinoj alkantas la zumado de la ciklostilo. Jen la redaktiejoj de la diverslingvaj bultenoj. Hispana, itala, germana, franca, angla, sveda, portugala, rusa, bulgara, greka. K Esperanta.

Pro la somera varmego la pordoj k la fenestroj estas vasten malfermitaj. La redaktantoj kun falditaj ĉemizmanikoj, klinitaj super la skribtabloj, laboras energie. Spite al la varmego.

Ni vizitu la direkcion de la poreksterlanda propagando. Simpla ĉambro. Eluzita skribtablo. Sur ĝi amaso da gazetaĵoj. La direktoro?. Kia direkroro sen pedelo! Jes. K-do kiel ĉiuj ni. Diferenco — nur respondeca pri la poreksterlanda propagando. Li ne estas el tiuj direktoroj, kiuj venas al laboro unu horon antaŭ ol foriri. Matene li antaŭas multajn el la redaktoroj. K foriras lasta.

Sed, kara leganto, sube vi demandis pri la Esperanto-Fako. Nu mi prezentu ĝin al vi. La kanapo estas iom eluzita. Sed vi ne estas pretendema. Vasta k luma ĉambro. Sur la muroj impresigaj afiŝoj. K nur 2-3 esperantistoj. Kie estas la aliaj? Multaj ja estas rekrutitaj k jam batalas ĉe la fronto. Tie estas A. Roig, Borque, E. Olmedo, G. Martínez, F. García, V. Roglá, Z. Beller. K multaj aliaj, kies nomojn nun mi ne rememoras. Poste kiuj restis—nu ilin la varmego elpelis al la plaĝo k la montaro. Tamen dum la aŭtuna k vintra sezonoj, kiam ekstere pluvas k malbonveteras, ofte ariĝas esperantistoj por helpi k pasigi tempon.

Nu sufiĉe. Mi okupu min, kara leganto, kun la aliaj 2-3 k-doj pri la ekspedo de la bulteno. Aliel vi ja ne povus legi ĉi raportaĵeton...

PARIO

# KULTURA LABORO EN LA SINDIKATOJ

En proleta Hispanio la sindikato estas la bazo, la ĉeangula ŝtono, sur kiu apogas sin la nova ekonomia strukturo. Krom ĝia ekonomia rolo la sindikato aperas same kiel centro de kulturo k klerigo. Kiel ilustro de ĉi penso ni legu kion skribas pri la kultura laboro de sia sindikato unu el niaj k-doj, apartenanta al la akvo-sindikato.

La aktualaj milit-cirkonstancoj absorbis, kiel logika konsekvenco, preskaŭ komplete la aktivojn de la tuta antifaŝista sektoro. La fiks-ideo estis laboradi k produktadi por la milito, por gajni la militon k, kiel konsekvenco, sekurigi la Revolucion.

Tamen ne estas direble, ke oni absolute ignoris la aliajn aktivojn. La ekzemplon ni havas ĉe nia sindikato. Nia biblioteko, antaŭe sufiĉe lil :ohava, sin vidis pligrandigita per novaj libroj dotalportitaj. K nature la alportitaĵoj, la nervismo de la unuaj milit-momentoj k aliaj kaŭzoj malhelpetis, ke ĉiuj libroj, kiuj devas formi por ni unu bibliotekon, pri kiu ni neniam eĉ sonĝis, troviĝu en modela ordo. Ĉi cirkonstanco embarasetas nin kontentigi tutakurate la petojn de la k-doj, kiuj volas havi laŭplaĉan legaĵon. Sed, kvankam kun ioma prokrasteto ni trafas kontentigi ĉiujn libro-petantojn. Ni posedas ja verkojn sciencajn, kiel same socialajn, artecajn, filozofiajn...

Ni ne volas ne mencii la etan Muzeon, kiun ni posedas. Ni diras eta pro ĝia nesufiĉa graveco, numera kiel arteca. Rilate al tio — ni esperas, ke iom post iom, kiam ja ĉio estos normaligita, ni entenigos ĉion, kio posedas artecan valoron, al la Kultura Institucio, kiu pli grandajn garantiojn al ni promesas.

Fine ni volas pritrakteti unu plian punkton, kiu ebie estas pli grava. Temas pri la instruado.

Nia sindikato, konscia pri sia responeco, elmontris ekde kelkaj jaroj al ĉi punkto specialan preferon.

Ekde 1934, paralele al la intensa laboro revolucia, sindikato dediĉis sian maksimuman forton, sen ŝpari rimedojn; establi noktajn klasojn por siaj anoj k ties filoj, ĉar kun estontkonsidero deziregis, ke la kultura nivelo de ĝiaj anoj estu kiel eble plej plialtigita por la sopirata tago. Pro tio krom la klasoj pri unuagrada instruado, ĝi establis la klasojn pri Esperanto, Muziko, Aritmetiko, Kalkularto, Fiziko, Hemio k Nocioj pri Algebro k Elektroteknikio.

# LA RACIONALISTA MOVADO EN KATALUNIO

La problemo pri la socio estas ankaŭ pedagogia problemo. Konsciaj k inteligentaj revoluciuloj, kiuj komprenis la valoron de la Pedagogio por la kreo de libera homaro, dediĉis sian vivon al la disvastigo k perfektigo de ĉi ideo.

La religio artifike inokulis sian perfidan moralon al la hispana spirito. La ideoj pri "patrio", "leĝo" k "stato", la vortoj "rezignacio", "obeo", la religiaj kredoj pri "postmorta vivo", pri ĉiopova dio, kiu regas la homojn k pri tiom da mitoj teksitaj de la fantazio estis mistifike enradikitaj en la konsciencon de pluraj generacioj, kreante dogmemajn spiritojn fermitajn por kia ajn socialisma ideo.

Kontraŭ ĉi dogmema k superrega edukado aperis nova pedagogia skolo —La Recionalismo. La famekonata anarkista revoluciulo Francisco Ferrer konigis en Hispanio la Novan Pedagigion laŭ sia revolucia vidpunkto. Li fondis la Modernan Lernejon, kiun li mem mastrumis k kie praktikadis la novan metodon. Lia devizo estis: Lasi al la infano mem formi sian personecon, liberan de ĉia ajn ekstera influo. La infano devas prezenti por la estonto kvalito, ne kvanto, devas fariĝi pensema, ne rutinema homo.

Ferrer estis mortpafita en la historia k sangavida kastelo de Monjuich en Barcelono. La eklezio venĝis siajn interesojn baritajn pro la kuraĝo de konscia revoluciulo. Ferrer dediĉis sian vivon k sian aktivon al la perfektigo de la novaj edukaj metodoj, iniciante en Hispanio la recionalistan movadon. Oni mortigis la majstron, sed lia ago plu vivas k vivos montrante al la homaro la solan vojon, kiu direkte kondukas al la libero—tiu de la racionalista kulturo.

* * *

Post 19 de Julio 1936, kiam la faŝista ribelo en Katalunio estis sufokita, oni trovis necese reorganizi la racionalistan movadon sur pli ampleksa bazo por atingi la nivelon de la revoluciaj cirkonstancoj.

Kreite la milita fronto, al kiu ni devis dediĉi niajn fortojn, organizite la laborista fronto, kiu devis proporciigi al ni la sufiĉan materialon por subteni nian ekonomion, decis reorganizi ankaŭ la trian fronton — tiu de la kulturo.

La fondo de la Regiona Federacio de la Racionalistaj Lernejoj en Katalunio estis konkero por la tria fronto.

Propagandi kulturon, disvastigi k ampleksigi la racionalistajn lernejojn, federi tiujn, kiuj jam ekzistas, krei potencan k determinitan racionalistan movadon estas la granda tasko de ĉi Federacio.

Kiajn projektojn havas la Regiona Federacio de la Racionalistaj Lernejoj en Katalunio? La projektoj estas diversaj. La ĉefa estas eldoni sufiĉan sciencan k pedagogian materialon. Por organizi ĉi fakon k akiri la bezonatan materialon oni projektas la fondon de propra eldonejo.

Alia celo estas formi verajn instruistojn, montrante al ili la kialon de la racionalista kulturo. Ĉicele oni baldaŭ malfermos specialajn kursojn k konferencojn Krome la Federacio intencas eldoni recionalistan gazeton por disvastigi la racionalistajn ideoj. Nun oni aperigas porinfanan gazeton ekskluzive dediĉatan al la infano.

* * *

Tiuj, kiuj sekvas atente ĉi pedagogian movadon, tiuj, kiuj havas eblon konstati la laboron efektivigatan ĉi rilate, tiuj, kiujn interesas la venko de la scienco k la kulturo super la malklereco k la indiferenteco, tute fidas al la racionalista movado. La Racionalismo ja estas la torĉo, kiu iluminas la vojon de la homo al la supro de la liberecana idealo.

CESAREO BORQUE
(I. L. E. S.-ano)

---

La atingita sukceso pro la plialtiĝo de la klereco kronis brile la klopodojn k se ne estus okazinta la malfeliĉmemora faŝista perfido, establita laŭ cikla metodo, nun ni ja povus, disponi grandkvanton da anoj kun kultura nivelo taŭga utiligi iliajn studojn, kiujn tiom bezonas niaj industrioj.

La eksperimento spertita ĝis nun kun la rezultoj jam akiritaj estis tre valora. Ĝi ja permesis al ni kun pli detala konoj desegni la liniojn por pli perfekta ordigo de la estontaj studoj.

# LA PARTOPRENO DE LA HISPANINO EN LA REVOLUCIO

La partopreno de la hispana proletino en la aktuala revolucio estas aktiva. Eĉ, oni povas diri, ke ŝia partopreno en la revolucio ne estas malpli grava ol tiu de la proleto. Kvankam ŝi ne posedas klerecon k alte disvolvitan intelekton. Si tamen posedas superlative vekan proletinan konscion. Eble kiel neniu alilanda proletino. Kio vekigis ŝian proletinan konscion? La bigoteco de la jezuitoj, la tartjufeco de la pastraĉoj, la vandaleco de la militistoj, la ekspluatado de la feŭduloj. La sklaveco. K ŝia impeta sopiro al emancipiĝo k libero. Jen klarigo pri la aktiva k ĉiuflanka partopreno de la hispana proletino en la aktuala revolucio.

Dum la unuaj tagoj de la revolució ŝi brave k abnegacie bataladis ĉe la barikadoj. Ŝultro ĉe ŝultro kun siaj samklasanoj. Kun armilo en mano. Poste ŝi senlace kudradis, stebadis vestojn por la milicanoj, kiuj abnegacie ekiris por liberigi la okupitajn de la faŝistoj regionojn. Ŝi anstataŭadis en fabrikejoj, uzinoj la virojn, kiuj jam estis foririntaj al la fronto. Aŭ ŝi mem ekflugis kun la milicanoj al la fronto por venĝi tiranon. En zonon ŝovinte pistolon. K virece pugnante manon.

La hispana proletino estas adekvate alloga, simpatia en ambaŭ okazoj. Tiome en la avangardo, kiome en la ariergardo. K ŝia etuziasmo ne elĉerpiĝas. Ŝia energio ne malpliiĝas. Ŝi pluen daŭrigas sian konstruan laboron. Kun la sama fervoro. Kun la sama ĵaluzo.

* * *

—En mia memoro ŝprucas, ankoraŭ freŝaj, rememoraĵoj el la nedelongaj majaj okazintaĵoj. Kun kia juneca entuziasmo ŝi kreskigis tiam barikadojn dum ŝiaj samklasanoj estis akirantaj kartoĉojn k muntantaj batalilojn!

Ĉe nia barikado kaprioladis pluraj junulinoj. 16-17 jaraĝaj belulinoj. Kun buklaj haroj. Kun magiaj okuloj. K kun aŭdacema koro. Ili kune kun ni pasigis noktojn ĉe la barikado. Maldormante vigle. Babile rankontante dolĉvoĉe epizodojn el la revolucio de 19 de Julio.

En unu strato virino vire vestita obsedis mian atenton. Ŝi estis kaŝinta sin malantaŭ parapeton. K ŝia mano tenis etan, sed solidan pistolon.

—Nu vidu, k-do, en ĉi-tiun domon kaŝis sin unu faŝisto. Mi ne lasos lin forkuri. Mi kaptos lin viva.

Ŝia voĉo sonis senhezite...

* * *

Neelnombreblaj estas la heroaĵoj elmontritaj de la hispana proletino dum la aktuala revolucia periodo. La historio rakontados al la idaroj pri senlacaj proletinoj, laborantaj en fabrikejoj k uzinoj, frakasantaj la katenojn de la sklaveco, detruantaj la kadukan mondon k forĝe konstruantaj novan. Poetoj plektados subtilajn versojn pri barikadaninoj, pri belaj sveltaj proletinoj, pasie amantaj la liberon, ĝismorte malamantaj la tiranion.

K la mondo tiam ekkonos la veran hispaninon. Ke ŝi ne estas tiu "Karmen", kiun ni konas nur el la libroj. Nur alloge belulino k temperamenta dancantino. Sed ankaŭ konscia proletino k pasia liberamantino.

PARIO

---

La redakcio esprimas dankon al samideano Delfi' Dalmau Gener pro lia donaco konsistanta el 35 libroj por la ĉefrontaj esperantistoj.

# KRONIKO

K-do A. Souchy, kiu dum la lasta monato specialmisie entreprenis vojaĝon tra Eŭropo, revenis al Barcelono. Dum sia vojaĝo li vizitis Francion, Anglion, Nederlandon, Danlandon, Svedion, Norvegion, Polion, k Ĉehoslovakion. Kiel delegito de C. N. T. lia misio estis plifirmigi la interrilatojn inter la sindikataj organizoj el la menciitaj landoj por komuna agado kontraŭ la internacia faŝismo.

El lia raporto ni ekkonas, ke en Ĉehoslovakio aperas 3 semajnaj revuoj dediĉi ataj al la hispania afero. En Svedio la sindikataj organizoj levis sian monhelpon al 1500000 fr. fr. En Polio k Aŭstrio, malgraŭ la duonfaŝista reĝimo, la laborista klopodo por helpi al proleta Hispanio estas intensa.

Dum intervjuo k-do A. Souchy i. a. deklaris: "Eŭropo laborista k sindikista kun la liberala k demokrata sentas, ke Hispanio solvos la mondajn problemojn nunajn k parton el la estontaj. Se ni scias taksi la hispanan revolucion, la libera Eŭropo havos fortikaĵon. Parto el ĝia estonto ja dependas de la venko kontraŭ la internacia faŝismo."

* * *

"Kritika Observanto" (n-ro 3) farante tre ampleksan raporton pri la mondpolitiko, i. a. konstatigas: "Estis Anglio, kiu senĉese amindumis ambaŭ faŝistajn ŝtatojn la plej perfortemajn, Germanio k Italio, k faris al ili amikajn servojn ĉiuspecajn, k se ne ĉio trompas, ankaŭ nun tendencas ne malgranda parto de la angla registara opinio al larĝgrada koncesiemo rilate al la germana registaro. La intereso de la angla reganta klaso rilate al tiaj servoj ne estas malfacile ekkonebla: Tiu-ĉi klaso tute ne havas antifaŝistajn tendencojn, ĝi devas esti konsiderata pli vere kiel kvazaŭ natura amiko de ĉiu faŝista ordo, ĉar ekzistas nenio, kion la anglaj imperiistoj timegas pli ol la plej etaj ĝermojn de vera pac-spirito k vera sindonemo al la Ligo Interpopola."

* * *

En sia lasta diskurso la satrapo Mussolini deklaris: "Ekde nun ĉiuj devas estis konvinkitaj, ke faŝista Italio tendencas praktiki konkretan pac-politikon."

Pro kio ekde nun? La faŝista Italio tendencis ankaŭ antaŭe praktiki konkretan pac-politikon. La abisenoj nekontesteble ja priatestos tion. K kio koncernas al la nuna konkreta pac-politiko de faŝista Italio—nu pri tio ne dubas, eĉ la italaj "volontuloj" forsenditaj al Franko.

Post ĉi pacifisma deklaro Mussolini elbuŝifis alian: "Mi diras plej kategorie, ke ni ne toleros en Mediteraneo la bolŝevismon aŭ ion similan". Ĉi deklaro jam estas la apogeo de lia pacifismo. K liaj submarenoj plej akurate obeas ĝin. Musolini pacifisto de la pacifistoj!!...

* * *

La Unio de la Sindikatoj en Londono deklaris sin kontraŭ la rekono de la batalrajto de Franko. La sekretario de ĉi organizo A. Wall adresis al Foreign Office leteron, kies teksto estis aprobita unuanime de la organizo. La lasta manifestas sian maltrankviliĝon, vidante ke ankoraŭ nenia adekvata mezuro estas prenita de Anglio por malebligi piratadon. Plie la organizo elmontras sin egale maltrankvila pro la onidiroj, laŭ kiuj la angla registaro preferus la rekonon de la batalrajto de Franko. La letero aldonas: "Ni kredas, ke la atribuò de tia rajto ne povas esti tolerata de la angla popolo."

**NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAUVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:**

| K-dino A. BOIS | K-do Adr. PERSSON | K-do T. C. KLIJN |
|---|---|---|
| á MECÉ par VITRÉ (ILLE-et-VILAINE) FRANCIO | STADSHAGEN 13 - A STOKHOLMO, SVEDIO | DAPPERSTR 123 - huis AMSTERDAMO, NEDERLANDO |
| Francoj, ne forgesu vialandan kotizejon! | Svedoj, kotizu al privialanda peranto | Nederlandanoj pagu lauvolan abonprezon al nia amsterdama peranto |

La kotizontoj el la ceteraj landoj povas sendi sian kotizon k monhelpon al nia k-dino A. BOIS k k-do Adr. PERSSON kiuj estas niaj internaciaj geperantoj.

Anstataú sendi al ni responkuponojn, kotizu do rekte al niaj geperantoj.

La hispanaj abonpagontoj estas petataj sendi la monon rekte al ni per posta giro. Adreso por ili: «INFORMA BULTENO», Esperanto-fako, av. Durruti 32-34, Barcelono.

Itala serĝento militkaptita deklaris, ke 4 regulaj italaj devizioj batalis kontraŭ Santander. Sed la oreloj de sinjoro Plymouth estas plenŝtopitaj...

* * *

En la marĉo de Casa de Kampo (apude de Madrido) kiu nun estas senakvigata, oni trovis la kadavron kripligitan de ino. Koncernas al milicanino, kiu estis militkaptita de la maŭroj en Novebro pasintjare, kiuj post kiam seksperfortis ŝin, mortigis ŝin pistole k nodinte ŝin al arbo, metis en la plej intiman parton de ŝia korpo moneron k amuze pafadis ĝis diserigo.

Franko povs rajte fieri antaŭ la mondo pro siaj virtuozaj civilizanto!...

* * *

En Berlino k aliaj gravaj centroj la polico arestis multe de personoj pro malkovro de terorista organizo, kiu preparis bombeksplodojn en diversaj oficialajkonstruaĵoj. La centro de la organizo estis en la laborista kvartalo en Berlino k estis direktata de junulino, ankaŭ arestita nun.

## TRE GRAVA

Ni avizas al ĉiuj organizoj, komitatoj, ateneoj, kulturaj societoj k unuopuloj, kiuj volas helpi la hispanan anarkistan k anarkosindikistan movadon ne sendi monon al la adreso de Ganin.

Estonte sendu monon al la sekvanta adreso: Nemesio Calves, 30, rue Saint Augustin, Paris, 2.

Ni petas la gazetojn represi la novan adreson de C. N. T. k F. A. I. k doni la maksimuman publikecon pri ĝi.

*La Nacia Komitato de C. N. T.*
*La Duoninsula Komitato de F. A. I.*

# LETERUJO

K-do T. C. Klijn.—Amsterdam. Ni jam sciiĝis pri la poŝtkonta afero pere de k-do. Bout, do ĉio restas en ordo. Jes, al ĉiuj ni sendas I. B.

Suno Vincento.—Gandia. Pri la eldono ni scias nenion. La movado statas bone. K-do. Roig estas ĉe la fronto. K-do. G. Mayo ankoraŭ estas vivantâ. Resaniĝon!

J. Bout.—Rotterdam. I. B. ni sendas al menciita adreso. Pri la poŝtkonto ni jam scias, ke estis vi, kiu petis al k-do, Klijn akcepti ĝin.

K-dino. V. Pin.—Francio. Dankon pri la resp. kup. k saluton!

K-do. Bertil Akerberg.—Stokolmo. Nian dankon pri la bondeziro k resp. kup. Vian averton ni jam priatentis.

K-do. Francis Gué.—Francio. Ricevitaj resp. kup. Dankon pro la frateca saluto. Pri la gaz. ni scias nenion.

Juventudes Lifertarias.—Salt. "Laboristo" kunandiĝis, kun "I. B." Abonkotizon sendu rekte al ni.

W. c. Brigden.—London. Jes, k-do., kiel vi povas konstati ankoraŭ estas homoj, kiuj utilas Esperanton por io plia ol kolekti p. i. kaj p. m.

Brita Esperanto Asocio.—Londono. Petitaj numeroj senditaj. N.° 13 elĉerpita.

J. Welser.—Marlaix. Materialo sendita. Laŭ ĉi-tiea oficiala ŝanĝo 100 fr. fr. = 56 pesetoj. Dankon pro la monoj!

B. Černev.—Plovdivsko. Sendita.

K-do. Frantisek Taraba. Rajecko. Dankon pri via agnosko rilate "I. B." n. Materialon ni sendos.

Artemio Español.—Alcover. La averto priatentita. Ni jam kritancis.

C. v. Walferen.—Amsterdam. Sendita. Pri la pago turnu vin al nia Amsterdama peranto..

Wilhelm Heller.—Leitmeritz. Ni sendados. Nian dankon pro via bondeziro.

Io van der Raaf.—Schiedam. Dankon pri via porhispania poŝtkarto.

J. Barry.—London. Ni regule sendados.

Tomás Sierra.—Fronto de Aragón. Ni sendos.

Juvencio Quixal.—Fronto de Aragón. Esperantajn broŝurojn ni sendos.

Mariano Chic.—Fronto de Aragón. Sendita.

Constantino Féniz.—Fronto de Aragón. Sendita.

Henriko Olmedo.—Fronto de Aragón. Pri la novaĵoj ĉe via fronto ni jam sciiĝis. Antaŭen sen timo!

Manuel Gil.—Fronto de Aragón. N... antaŭdankas vin pro la sendita monsumo.

Francisko Soro.—Fronto de Aragón. Poŝtkarto ricevita. Jes, ni sendos. Se eblas 6 pts.

Vicente Roglá.—Fronto de Guad... Artikolon dé vi ni atendas.

Torcuato López.—Fronto de Andaluzio. Ni sendos. Plie ni ricevis respondkuponojn de jenaj k-doj.

Isidor Norling (Indalsalven); Th. Steijn (Rotterdam); A. Smit (Amsterdam).

B. Rasenberg.—Rotterdam. Dankon pro la poeriaĵo. Presota en la venonta n-ro. Sendu laŭeble la melodion. Viaj konsideroj estas tute veraj.

ESPERANTO PRES-SERVO DE I. L. E. S.
(Iberia Ligo de Esperantistoj Senstatanaj)

Imprenta Cultural - Salmeron, 241 - Telf. 81076 - Barcelona